

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 54 49150 BAUGE
Peranto: IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l'Espéranto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 3 F. Abono: 13 F. Kotizo: 2 F. Sume: 15 F. ====

+++++

N. B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de februario, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N° 128 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== MARTO 1981 ====

+++++

BILETO DE LA PREZIDANTO.

Le château de Grésillon, à Baugé, accueillera notre congrès 1981. Chacun connaît, au moins de réputation, la Maison Culturelle Espérantiste, où les rencontres et les cours de tous niveaux sont organisés chaque année pour des stages d'initiation ou de perfectionnement. Nous sommes heureux de vous convier à bénéficier de ce cadre particulièrement dédié aux progrès et à la diffusion de la Langue Internationale.

Notre précédent bulletin présentait à votre réflexion la convergence entre la pensée de nos Evêques sur la multiplication des contacts entre chrétiens et sur l'esprit missionnaire, se concrétisant dans l'utilisation des moyens modernes de la communication, avec les buts que nous poursuivons.

La possibilité de se comprendre directement entre hommes de tous les pays, de se connaître, de correspondre, d'unir ainsi leurs efforts en vue du progrès sous tous ses aspects est évidemment une solution qui va au-delà de tous les autres moyens et les dépassera quand la L.I. se sera répandue dans toutes les couches de la société.

Mais si cela est vrai pour les sciences humaines et pour les relations culturelles, cela l'est aussi pour le développement des échanges entre les communautés ou les personnes animées par la pratique commune d'une vie spirituelle et des œuvres dictées par l'amour des hommes dans la justice du Dieu de tendresse et de miséricorde.

Que signifierait pour nous la fraternité avec tous les hommes, créatures et fils du même Père, si notre adhésion au mouvement espérantiste ne nous amenait à étendre, dans la mesure de nos possibilités, la communion dans l'ordre surnaturel, en même temps que les rapports culturels et amicaux?

A l'occasion de notre congrès, nous vous invitons à prendre conscience de cet aspect particulier des raisons d'être espérantiste pour un chrétien: pratiquer et vivre ces relations, développer ces contacts qui ont pour objet l'unité de la foi en Jésus-Christ, la vie spirituelle commune entre chrétiens, la

RADIO ROMA - ESPERANTO

RADIO VATIKANA 50-JARA

Teksto de Magnani, traduko de De Salvo

Antaŭ 50 jaroj, Guglielmo Marconi starigis Vatikanan Radion. La evento estis memorigita per parolado farita de la Ŝtata Sekretario, Kardinalo Casaroli, kiu, antaŭ 50 jaroj, ĉeestis la inaŭguron de la radio-stacio kiel juna seminariano.

Okaze de la datreveno, oni omaĝis al la itala sciencisto Guglielmo Marconi dediĉante al li la Ĉefsalonon de la Radio-stacio. En ekspozicio, porokaze aranĝita, estas videblaj multaj historiaj objektoj: ekz. la mikrofono per kiu la tiama papo pio XI-a eldiris sian unuan radio-mesaĝon.

Nun, Radio Vatikana elsendas en 34 lingvoj al 170 landoj de la tuta mondo.

* * *

750 JAROJN POSTE

Teksto de Antomangeli, traduko de De Salvo

Fortika, alta iom malpli ol 170 centimetrojn, kun nigraj haroj, longa vizaĝo, hoko-forma nazo kaj profunde enkavigitaj okuloj. Ne temas pri identiga bildo, prilaborita de la polico por serĉi krimulon, sed pri la aspektaĵoj de Sankta Antono el Padovo. Elstara ekipa de sciencistoj, nomitaj de la Papo, la 6-an de januaro malfermis la tombon de la franciskana monaĥo por ekzameni liajn restaĵojn.

Oni ekvidis, krome, ke la kranio de S-ta Antono estas pli granda ol normale kaj ke ĝi gastigis cerbon tre ampleksan. Kontraŭe, ne estis eble ekscii la kaŭzojn de la morto, kiu trafis la Sanktulon, antaŭ 7 jarcentoj kaj duono, je apenaŭ 43 jaroj.

La kadavro de S-ta Antono estas ekspoziciita al la fideluloj ĝis la 15-a de februaro, poste ĝi estos demove entombigita, interne de kverka ĉerko.

* * *

MORTIS PASTRO ZENO, FONDINTO DE NOMADELFIO

Teksto de Spinelli, traduko de De Salvo

Mortis la 15/1/81 P. Zeno Saltini, fondinto de la komunaĵo "Nomadelfio" (apud Grosseto, Toskanio), urbo, kie regas frata amo (Nomadelfio, el la greka, signifas "loko, kie la amo estas leĝo").

P. Zeno naskiĝis, antaŭ 80 jaroj, en Fossoli di Carpi apud Modeno (Emilio); li apartenis al tradiciema familio, kiu posedis vastan bienon en la Pada Ebenaĵo. Tre baldaŭ, tamen, li forlasis la komforton de la familio por dediĉi sin al la revo starigi komunaĵon de homoj liberaj kaj regataj de la principoj de totala kristanismo. Li decidis iĝi sacerdoto, kaj kiam, en 1931, li celebris sian unuan Meson, li volis ĉe la unua vico, meze de la aŭtoritatuloj, 18-jaran knabon, ĵus elirintan el karceroj, kie li estis enfermita pro etaj ŝteloj: "Mi adoptas ĉi tiun knabon kvazaŭ filon. Kiu eraris ne sukcesas elĉeti sin, se iu ne fidas al li." Tiu estis la unua faro de la batalo de P. Zeno por reakiri al la socia vivo la senhejmajn, senkuraĝajn, senesperajn homojn, plejparte infanojn kaj geknabojn orfajn kaj forlasitajn. Naskiĝis, tiel, en la vilaĝo San Giacomo di Roncole, la unua komunaĵo, kie bonaĵoj kaj laboro estis komunaj. Sed precipe en la tuja postmilita periodo P. Zeno trovis sian genton. En 1947, gvidante siajn "gefilojn", li okupis la teron de la iama koncentrejo ĉe Fossoli, kaj sukcesis transformi tiun lokon en urbon, kie la amo estas la sola leĝo. P. Zeno laboregis por vivteni sian komunaĵon. Li frapadis ĉe la pordo de la riĉuloj, kaj li eĉ vagadis tra la stratoj de Modeno, ludante akordionon, por gajni iom da mono. Intertempe, la loĝantaro de Nomadelfio kreskadis, kaj iam la komunaĵo translokiĝis al la ĉirkaŭaĵoj de Grosseto. Sed la iniciato de P. Zeno ne ĝuis multe da simpatio ĉe la politikaj kaj ekleziaj instancoj, kiuj ne ŝatis la komunecan etoson kaj la miksitecon de la familioj. P. Zeno do forlasis pastrecon, kaj Nomadelfio dissolviĝis. Rezistis nur eta kerno, kiun la iama pastro, iĝinte laiko, organizis sur civila bazo, kiel societon: temis pri 400 homoj dividitaj laŭ 12 "familioj".

En 1962, Papo Johano XXIII-a permesis, ke P. Zeno reakiru sian pastran oficon, kaj nomis lin paroĥestro de tiu urbo baziĝanta sur la amo. Antaŭ ol morti, la fondinto de Nomadelfio lasis spiritan testamenton en kiu li invitas la nomadelfianojn daŭrigi lian mision; li fimas per ĉi tiuj vortoj: "Kiam mi mortos mi ne volas plorojn, oni ludu valson de Strauss".

- 5 -
EKUMENISMO EN ROMO

Teksto de Milana, tradukø de De Salvo

Dum kelkaj tagoj en la jarŝanĝa periodo, la 150 romaj paroŝoj gastigis 25000 gejunulojn, venintajn el tuta Eŭropo por renkontiĝo iniciatita de la komunaĵo de Taizé. Temis pri daŭrigo de la koncilio de la junularo, proponita antaŭ kelkaj jaroj de Frato Schultz, fondiĝo de monaĥa komunaĵo en Franclando por akcepti la rifuĝintojn de la dua mondmilito.

Ekde la fino de la 60-aj jaroj, Taizé iĝis celo de centmiloj da gejunuloj, engaĝitaj en iu religia kaj socia strebo, kiun la komunaĵo sinteze indikis per la devizo "Lukto kaj kontemplado". Post kunvenoj en diversaj landoj (Paris en 1978, Barcelono en 1979), ĉijare la "gejunuloj de Taizé" venis al Romo, gastoj de romaj familioj. En la koncernaj tagoj, okazis renkontiĝoj, meditado kaj preĝado; kelkaj el ĉi tiuj iniciatoj disvolviĝis en la Baziliko honore al Sankta Johano (la roma katedralo), kiu, por la unua fojo, estis tiel utiligita por ekumena preĝado. La 30-an de decembro, la gejunuloj estis ankaŭ akceptitaj en aŭdienco de la Papo.

BIBLIA NOMARO (daŭrigo)

AĤAN (malpaciganto)

La Izraelidoj pekis denove
Kontraŭ la leĝo de la anatemo
Kaj ili agis tute fiamove.

Ili ne venkis malgraŭ stratagemo
La urbon Aj' per amreo malmulta
Kaj revenis kampe ne sen problemo.

Malkuraĝiĝis l' popolo singulta.
Jesu' vestoŝira, vizaĝaltere
Antaŭ la tre sankta kesto konsulta

Restis pente preĝanta ĝisvespere.
"Leviĝu, traserĉu, kulpas Izrael'
pro ŝtelo kaj mensogo koopere".

Ĉu nune jam estas apud mi ribel'
Kaj malamiko en mia akompan'
Pro amo de mono, amo de juvel'?

Ĉu Judaso kuŝas en kor' de Aĥan?

23/2/1978.

AĤAZ (Javeo mantenas)

Aĥaz, Jotama fil', mantena de Javeo,
En danĝera situo, al kiu vi rigardas?
Ĉu al Dio helpanta? Ne! Al Moleĥ vi ardas
Per okulstreĉ' kaj eĉ al reĝo por obeo,

En aĉa allig' per don' el palaca trofeo.
Kaj num en fajrhel' kun trist' la filo konsumhardas.
Ve! en templo parfumoj altrudaj putre nardas
Spite al la leĝa ord' donita de Moseo.

Kial do vi fariĝis de l' Asirio ĝemel'?
Kial do vi sklavece per fuŝhontinda aklam'
Alpreĝas erarvoje malgraŭ davida fidel'?

Ĉu vi do ne atentis pri la jesaja proklam'?
Ĉu do vi ne aŭskultis vorton pri Emanuel
Por komplete forgesi ordonon al Abraham'?

24/2/1978.

AĤAZJA (Izraela reĝo)

Ĉu neniam finiĝos l' izraela idolkult'?
Post Aĥab kaj Izebel eksidas reĝo nova
Permome ne perage, malbonon tiel kova
kaj fara. Ho Aĥazja, al kiu do la konsult'?

FRATARO CLAUDIUS COLAS: 6) F-ino Vanneau (2-a donaco). Sumo: 305 F.

Plej koran dankon!

xx

KOTIZTABELO 1981

IKUE kun "Espero Katolika" 60 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

* * * * *

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 15 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 7,50 F
Bonfaranto 75 F
Dumviva membro 300 F

UFE kun "Revue Française" 105 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 135 F

Abono al "Biblia Revuo" 36 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xx

Dépôt légal: 2ème trimestre 1981 !! Polycopié par F. M. C.
C. P. P. n° 62 532 !! Prieuré St-Martin La HOUSSAYE-en-Brie
Directeur-gérant: Roger Despiney !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE